

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1978 I

KULTURAJ KAJEROJ

1978 JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Trajana Kolono T. Macovei

Ikaro ĉiama S. Bourot

Pri atlantido

Rubens R. Lloancy

Ĉiuj rapidas hejmen trad. I. Nagy

Polica enketo

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

Denove ĉijare ni konsilas rapidan aliĝon al unu el la someraj periodoj. Jam regule alvenas informpetoj kaj aliĝoj el la kvin kontinentoj. Ne atendu ĝis la tagoj, kiam la ĉielo, la naturo memorigos vin pri la alproksimiĝanta ferio-tempo. Oni pensu pri la suna libertempo jam dum la grizaj laborplenaj tagoj. Kiam la floroj diros al vi, ke baldaŭ venos la somero tiam, eble, estos tro malfrue : ni ne plu povos plenumi viajn loĝpetojn. Tuj aliĝu.

Vi eble jam konstatis, ke la kalendaro de la diversaj somerperiodoj estas la sama, kiel pasintjare. Ni denove proponas la « preleg-serion » la unuajn tri semajnojn de julio. Ŝajnis, en 1977, ke tiu ŝanĝo ekvilibrigis la nombron de la ĉeestantoj en la diversaj periodoj. Ĉu tiu konstato konfirmiĝos en 1978 ?

Ankaŭ la programo multe similas la lastjaran: prelegoj, kursoj, diversaj manlaboroj, ekskursoj. Eble aldoniĝos aliaj eroj. La celo de nia laboro estas ĉiam la sama. Ni deziras doni al ĉiuj ĉeestantoj la eblecon, per komuna vivado, plulerni kaj praktiki la lingvon. Ne ĉiuj komprenas tion, kiuj pli emas paroli la nacian lingvon ol la internacian. Lingvon oni povas eklerni per kurso. Sed plulerni oni povas ankaŭ, ĉefe, per praktikado en ĉiuj cirkonstancoj : ĉe la manĝo-tablo, ludante per pilko, globetoj aŭ kartoj, promenante en la parko, ktp... Oni multe lernas tiamaniere. Kurso ebligas vin konstati kaj kompreni viajn erarojn, precizigi vian esprimadon. Kiu estus la utilo de lingvo ne uzata ? Ni ĉie proklamas, ke esperanto estas vivanta lingvo. Kompreneble ĝi tia estas... almenaŭ por tiuj, kiuj ĝin vivigas.

Esperanto tra la Mondo

Sciigoj pri la Universala Kongreso en Varna

— Iuj kongresanoj havos eblecon renkonti bulgarajn samfakulojn ĉe specialaj akceptoj (verŝajne kun bulgaraj virinoj, sciencistoj, ĵurnalistoj, eble kun instruistoj, kuracistoj).

— Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (C.E.D.) organizos konferencon pri esperantologio.

— Okazos Internacia Infana Kongreseto por esperantistoj 6-ĝis 13-jaraj (Aliĝiloj haveblaj ĉe la konstanta adreso de la U.K., en la sidejo de U.E.A.).

— La 46a kongreso de blindaj esperantistoj okazos, samloke kaj parte samtempe kiel la universala (ĝi verŝajne daŭros unu semajnon pli longe).

— Inter la tuttagaj ekskursceloj de la universala estos la rumana urbo Mamajo kaj la antikva ĉemara bulgara urbo Nesebro.

— Oni esploras la eblecon de infanvartejo kun labordivido inter la koncernaj gepatroj.

Renkontoj de Neùtrala Esperanto-Movado

— La 30an, 31an de Aprilo kaj 1an de Majo 1978, C.E.P.E. organizas esperantistajn studtagojn en Lyon, kun la partopreno de Profesoro Ivo Lapenna. Petu informojn de C.E.P.E., 5, rue Léon Cogniet 75017 Paris.

— De la 22a ĝis la 29a de Julio 1978, en Jaca (Centraj Pireneoj, Hispanio) okazos la 4a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Petu informojn de F-ino Ines Gaston P° Marina Moreno, 35, 4° dcha Zaragoza 1 (Hispanio).

Interesa fenomeno : la disvastiĝo de Esperanto en Irano

2500 gelernantoj, 7000 lernlibroj fulmrapide venditaj, reeldono de sama kvanto, jen la mirinda rezulto de la agado de unu sola homo en Teherano, D-ro Saheb-Zamani, ne parolante pri multaj gazetartikoloj, prelegoj, aktiva subteno de eminentuloj, ekspozicioj, dejoro de du oficistinoj en la universitato de la irana ĉefurbo, ktp... !

Interesega intervjuo de D-ro Saheb-Zamani aperis en « Esperanto » de Decembro kaj Januaro. Espereble multaj esperantistoj legis ilin kaj meditis pri la originalaj ideoj esprimitaj.

D-ro Saheb-Zamani klarigas kial li konsideras internacian lingvon grava por sia lando kaj la tria-mondaj popoloj : Esperanto estas facile akirebla komunikilo ebliganta atingi la sciencan kaj teknikan scion sen antaŭa multjara studado (multekosta) de dua nacia lingvo, kiu plej ofte donas nekontentigajn rezultojn.

Evidentiĝas ke tia vidpunkto, verŝajne klarvida, devigos nian movadon, je ĉiuj niveloj, rekonsideri sian strategion kaj la necesajn eldonaĵojn por vere disvastigi la internacian lingvon en Oriento, Afriko kaj Latina Ameriko.

Signifa raporto en Unuiĝintaj Nacioj

Raporto pri « la sekvoj de aldonaj lingvoj en la UN-sistemo » estis lasttempe publikigita de U.N. Tiu raporto redaktita post enketo de inspekta, grupo, sciigas ke la organizaĵoj de U.N. elspezis en 1976, en tute 105 297 000 dolarojn por la lingvaj servoj.

La problemo, tamen, ne estas nur financa. Ekzistas grava manko de interpretistoj kapablaj traduki el la araba aŭ la ĉina en aliajn lingvojn, precipe en la hispanan aŭ rusan. Oni kutime devas interpreti en tiujn lingvojn « tra » la angla aŭ la franca, kun sekva multobliĝo de eraroj kaj miskomprenoj.

La konkludoj de la raporto estas iom pesimismaj, kaj plej verŝajne la situacio pli malboniĝos.

... Malpli kostan kaj pli simplan solvon proponis R. L. Harry, la aŭstralia ambasadoro al U.N. (kaj esperantisto). Li proponis ke U.N. adoptu unu solan interlingvon kaj prezentis 5-jaran planon por la enkonduko de la internacia lingvo Esperanto.

Laste aperis...

— « La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha » de Miguel de Cervantes, epokfaranta traduko de Fernando de Diego, kun ilustraĵoj de Gustave Doré, 820 paĝoj.

— Kvar poeziaroj tradukitaj el la franca lingvo : « dudekkvar sonetoj » de Louise Labé, traduko de W.T. Oeste ; « La ĥimeroj », de Gérard de Nerval, kaj « la renesanca periodo », « la Trofeoj, la sonetaro » de J. M. de Heredia, tradukoj de Waringhien.

— « Fianĉo de l'sorto », originala romano de J. H. Rosbach.

— « Kantoj, poemoj kaj satiroj » de Robert Burns, traduko de Reto Rossetti kaj William Auld.

— « Tiele parolis Zaratuŝtra » de Friedrich Nietzsche. El la germana tradukis W. A. Verloren van Themaat.

— « Gudrun » romano de Joh. V. Jensen, tradukita el la dana.

En Koreo

Nun agadas en la universitato Dunguk, en Seoul, sperta Ĉe-metodo instruisto, S-ro August Weide. La nova esperanto-fako de la universitata biblioteko bezonas ĉiuspecajn esperantaĵojn, gazetojn, ktp... Adreso : S-ro August Weide, Universitato Dunguk (Biblioteko), Jongsangu, Seoul 140, Suda Koreo

Ĉu pli « favora vento » en Ĉinio ?

Oni scias ke estas eldonita en Ĉinio monata revuo en Esperanto, malkara, bele presita kaj en bonega lingvo : « El popola ĉinio » (krom radio-elsendoj).

Tiu gazeto, fakte, praktike neniam aludis pri la movado mem.

Sed, en la numeroj de Decembro kaj de Januaro, aperis kape artikoloj pri Esperanto, krom aliaj priesperantaj novaĵoj.

Ni esperu ke tio estas preludo por reaktivo de esperanto-movado en tiu granda lando.

Ni notu cetere ke la eldonado de libroj (verkoj de Maŭ Zedong, aŭ pri nuna ĉinio, aŭ por infanoj) neniam ĉesis.

Se vi vojaĝos al Ĉinio, ne manku antaŭe kontakti : Ĉina Esperanto Ligo, P.O. kesto 77, Pekino.

En Venezuelo

Lasttempe, oni rimarkis plivigliĝon de la intereso por Esperanto en tiu lando. Okazis intervjuoj en radio kaj televido. Universitata Esperanto-Centro estis fondita.

Adreso de Venezuela Asocio de Esperanto : Apartado 3833, Caracas 101.

« Tra l'mondo », valora disko (aù kaseto)

Ni atentigas niajn legantojn pri la eldono de tiu bona grandformata disko (aŭ kaseto) de tradukitaj diverslandaj kantoj. Traduko de Claude Piron. Kantisto : Olivier Tzaut (Svislando).

TRAJANA KOLONO


La vizitanto de la Historia Muzeo en Bukareŝto estas jam de eniro altspirite frapata de vera mirindaĵo de la romana arto. Antaŭ liaj okuloj prezentiĝas, unu apud alia, la konsistaj partoj de grandega kolono. La paralelipipeda piedestalo kun ties bazo — kunmetita el 45 muldaĵoj — kaj la kapitela volumo kun la statua soklo staras meze de grandega ejo. Ĉirkaŭ la muroj, poste, enviciĝas longa serio da 125 muldaĵoj, reprezentante la historiita friso kiu volviĝas sur la fusto de la kolono. Fine, parta plastikaĵo de ĝia forumo kompletiĝas la eksponojn.

Tio estas unu el la kvar kopioj de la fama kolono kiu staras ankaŭ hodiaŭ, post preskaŭ 19 jarcentoj, en la centro de la Trajana Forumo de Romo, en la akso de la templo dediĉita far' de la romana popolo al tiu fama imperiestro.

konstruaĵojn, kiel specifas la vota enskribo sur la alirpordo al la interno de la kolono :

« La romana senato kaj popolo /starigis tiun ĉi monumenton/ al imperiestro Cezaro, filo de Nerva pasigita inter la dioj, Nerva Trajano Aŭgusto, venkinto de germanoj, dacoj, granda pontifo investita la XVII-an fojon kun la tribunuma potenco, aklamita sesfoje kiel imperiestro, konsulo por la VI-a fojo, patruja patro, por montri kiom alta estis la monto kaj la loko fosita per tiom grandaj fortostreĉoj ».

La dacoj ne estis slava gento, kiel erare mencias la Plena Ilustrita Vortaro, sed ili devenas de la tracoj, pri kiuj Herodoto atestas, ke estas la plej multenombraj post la hindoj kaj kiuj loĝis la spacon norde de la Balkana duoninsulo, de Danubo kaj de Karpatoj. Ili estis submetitaj



La aparte valoraj kopioj estis mulditaj laŭ negativa muldaĵo plenumita en la jaro 1870 laŭ la iniciativo de la imperiestro Napoleono III. La ceteraj kopioj de la Trajana Kolono troviĝas : unu en la Laterana Muzeo de Romo, alia ĉe la Muzeo Saint-Germain en Francio kaj la lasta en Albert and Victoria Muzeo en Londono. Tamen, eble nenie en la mondo ĝia loko estas pli taŭga ol tie ĉi, en la rumana ĉefurbo, ĉar, per sia temo — la militoj de la romanoj kun la dacoj — ĝi estas aparte valora, ŝtonskribita dokumento pri la gloraj praavoj de la rumana popolo, senmortigitaj de la tiamaj talentaj artistoj dum heroa interbatalo.

Tiu ĉi triumfa monumento, kiel ankaŭ ĉiuj el la grandega Forumo, estas verko de Apolodoro el Damasko, fama romana arkitekto kaj milita inĝeniero, kiu konstruis ankaŭ la ponton sur la Danubo ĉe Drobeta. Li starigis la kolonon en la jaro 113 p.k. memore al la venko de la romanaj armeoj, gviditaj de la imperiestro Trajano, super la dacoj, kondukitaj de ilia reĝo Decebalo. Ĝi estas 39,83 metrojn alta kaj ĉirkaue kovrita de spirala bareliefo reprezentanta scenojn el la supremenciitaj militoj.

La alteco de la Kolono korespondas al tiu de la monteto niveligita de la konstruistoj por lokigi la forumajn

de la Romana Imperio per du detruigaj militoj, inter la jaroj 101-102 kaj 105-106 p.k.

La historiita friso de la Trajana Kolono rakontas detale en bareliefoj la disvolvo de tiuj du militoj.

Post la heroaj bataloj, la mirinda rakonto en ŝtono finiĝas per paca bildo de la dacoj, kiuj malsupreniras de montoj kaj arbaroj kun siaj familioj kaj la tuta havajo al siaj hejmoj en valo, kie ili plue vivos apud la romanoj kaj intermiksiĝos kun ili.

El la romanigo de la daca gento kaj grada asimiligo de la slavoj kaj de aliaj gentoj naskiĝis, dum la lastaj jarcentoj de la unua jarmilo, la rumana popolo, sur la nuna teritorio de Rumanio. La supervivo de tiu latinida insulo meze de la slava maro konstituas veran historian miraklon des pli ĉar ĝi gardis eĉ la plej proksiman nomon de sia deveno el inter ĉiuj latinidaj gentoj.

Parolante, per ŝtoncizitaj bildoj, pri la kunpremo el inter la brava romana popolo kaj la sentimaj dacoj, tiu Kolono estas do autentika, longedaŭra dokumento pri la genezo de la kuraĝa kaj diligenta rumana popolo.

Prof. Toma Macovei — Rumanio

IKARO ĈIAMA

Ja, la mitoj neniam mortas ; tion oni bone scias. Ili evoluas, transformiĝas, greftiĝas, kaj burĝonas kiel rifoj, kiel vegetalaj rifoj.

Tiu ĉiameco de la mitoj, sub formoj senĉese renovigitaj, laŭ la jarcentoj, laŭ la civilizacioj, bildigas la ĉiamajn aspirojn de la homaro.

Restadi en Kreto estas subite retroviĝi kun Ikaro.



Certe, ne plu estas la Minoa nudtorsa silueto, envolvita en blua « pagno ». Li estas hodiaŭa viro kun fajna vizaĝo, longhara, vestita je bluaĉa « jean-pantalono ». Lia rigardo estas ironia, liaj paroloj kelkfoje insolentaj. Sed liaj silentoj ellasas la memoron de la pasinta tempo.

— Kial vi tiel haste forlasis Kreton ?

— Kaj kiel mi estus restinta tie ? Minoo kondamnis min al la Labirinto, por ĉiam. Oni forkuras el malliberejo, el fuorto, el pundomo... Oni ne forkuras el la Labirinto. Por eterne, mi esti enfermita ĉi tie... ĝis mia morto mi estus devigota vagi laŭ ŝimodorantaj koridoroj... Kaj, precize, mi ĉiam abomenis la teron, la subterajojn, la meandrojn, la tranĉeojn... Bone komprenu : mi tute estas la malo de speleologo... Mi amas la aeron, la rektajn liniojn, la vastajn horizontojn. La senlimaj spacoj tute ne timigas min.

Enfermante min en tiujn katakombojn, Minoo sciis tion, kion li faris. Mian animon... li tie enfermis, mian animon li kondamnis al Morto. Li volis, ke mi, eterne, restu raŭpo... dum mia tuta vivo mi revis fariĝi papilio.

Tial, unu tagon, mi ne plu povis elteni. Kaj mi petis mian patron : « Dedalo, helpu min eliri el tie ĉi. Helpu min ekflugi. »

Kaj, ĉar li estas mane lertega, li aranĝis por mi flugilojn.

— Faris ? Aŭ faraĉis ? Ili ne longe daŭris !

— Estas evidente, ke tiel ŝercante, oni ne sentas la esencan problemon !

Por mi, ne gravas, ke mi falis ! Plej ĉefas, ke mi ekflugis. Cetere, mi falis, ĉar mi estis ekfluginta... ĉar mi, de tre proksime, frontrigarde vidis la sunon.

Ŝajne, ie, iuj dioj tute ne ŝatis tion...

Ikaro silentas, li kutimgeste glatigas siajn harojn...

Li meditas : ĉu pri sia falado ? Lia rigardo vagas tra la spaco. Ĉu li kredas sin Heroo ? Ĉu Kreto, ĉu Labirinto ankoraŭ estas en lia memoro ?

— Ĉu la Labirinto estis tiel terura ?

— Ĉu fluganta papilio ankoraŭ memoras pri sia raŭpa estado ? Ĉu ĝi, senĉese pensas pri la tero ? Pri la radikoj ? Fidu min : koncerne sian subteran vivon, ĝi ĉion forgesis... Se ne, ĝi ne plu povus flugi.

Ankaŭ mi. Ek de la momento, kiam mi ekflugis, mi forgesis Kreton. Mi pensis, ke flugi estis tute simple iri de unu loko al alia loko laŭ la plej mallonga vojiro. Sed ne : Flugi estas fariĝi birdo. Tuj kiam mi alproksimiĝis al la ĉielo, tuj kiam la lazuro cirkaŭis min, subite mi retrovis min sen pezo, sen memoro. Mi ĉesis esti homo, tuj kiam, sube de mi, la maro aspektis kiel blua konko.

— Sed poste ? Dedalo, via patro, trankvile flugis ĝis Sicilio.


Dum vi...

— Dedalo nenion lernis, dum tiu vojaĝo, nenion forgesis. Li nur movis siajn flugilojn ; dum

horoj, pensante nur pri la insulo, kiun li forlasis, nur pri la insulo, kiun li celis. Li ne ĉesis esti teremulo. Antaŭ sia flugo, li ĉion studis kaj ĉion antaŭvidis : la direkton kaj la forton de la ventoj, la altecon de la suno, la ciklonojn kaj la anticiklonojn, la horan malsamecon. Sed, bone aŭdu, mi, mi havis nenian flugplanon.

— Sed... finfine...

— Jes, finfine ; pli ĝuste diri : je la fino de la vojaĝo, mi falis ; jes, mi falis. Sed necesas kompreni : ekzakte, estas mia falo, kiu igis tiun flugon memorinda. Eĉ hodiaŭ, oni ankoraŭ ĝin elvokas. Pruvo ? Vi intervjuas min. Dum ĉiuj homoj forgesis Dedalon kaj lian flugon al Sicilio. Tamen, je tiu epoko, iri ĝis Sicilio estis grava afero. Sed post lia sukcesita ekskurso... Silento ! Neniu vorto, neniu intervjuo, neniu artikolo en la ĵurnalo. Nur pri mi oni parolis. Kial ? Precize ĉar mi, nur mi, estis falinta. De longtempe mi rimarkis, ke la pensemuloj ne interesiĝas pri la feliĉaj herooj. Oni ne amas la emeritajn heroojn, la emeritajn Titanojn : Dedalo, Epimeteo, kaj multaj aliaj, kies nomoj estas forgesitaj.



Mi, mi estis fulmobatita. Tial, mi ankoraŭ vivas.

— Kiu estis Ikaro ? Senkonscienculo ? Vantemulo ? Aŭ pli ĝuste timemulo ? Aŭ ĉu li similas tiujn flugantajn mekanikistojn, kiuj, inter la du militoj, ĉiariske superflugis marojn kaj sablajn dezertojn ?

— Ne, ne, mi ne estis la unua aviadisto, mi havis nenion komunan kun aviadisto. Mi flugis per miaj propaj flugiloj... kiel birdo, sed ne kiel aviadilo. Mi silente altiĝis sen kompaso, sen komputilo. Rekte antaŭen ! Rekte al suno !

Ne kredu tiujn ĉiujn postajn klaĉojn ; oni diris : « Neniam Ikaro havis flugilojn ! Li stulte falis en la akvon, aŭ de barko dum ventego, aŭ alteriĝante en Samos ». Tiuj klaĉoj estas nur rakontoj de enviuloj aŭ de senkapabluloj.

Mi surmetis flugilojn. Mi ekflugis. Mi falis. Tio sufiĉas. Li silentas, kun ironia vizaĝo, provoka vizaĝo :

— Revi ne sufiĉis al mi. Revante, laŭplaĉe vi povas flugi. Sed provu : surmetu flugilojn : tuj, la dioj, la psikologoj, la klaĉantoj malhelpos vin flugi.

Anstataŭ stulte rideti, iom cerbumu. Vi, kiu ne estas birdo, diru : Kial oni altiĝas al la suno ? Jes, por tuŝi la lazuron, por renkonti la fajron. Ĉu ami la lazuron estas krimo ?

— Kaj via patro ? Al li, vi ŝuldas viajn flugilojn !

— Ĉu tion oni povas diri ? Mi longtempe pensis, ke li, intence, surmetis al mi iajn ajn flugilojn, fiksitaj nur per vakso. Eble por poste pravigi lian emeritulan moralon ! Mi ne ŝatis liajn konsilojn, kiam mi estis preta ekflugi. Prudentaj konsiloj ; de jarcentoj, ili estas la samaj : « Ne tro altenflugu ! Vi falus ! ». Kiu misero !

Mi, en Kreto, mi perdis nur la liberecon kaj la vivon. Tial, mi ankoraŭ vivas...

Li senhaste malproksimiĝas, per supla, sed laca, paŝado. Dikaj krep-plandumaj ŝuoj postlasas profundajn spurojn sur la grundo. Kun tiaj ŝuoj, la espero de ekflugo estas morta. Pro la tuta pezo de siaj perditaj flugiloj, Ikaro foriras forte pezante sur la tero.

Suzanne BOUROT.

PRI ATLANTIDO

Urboj kaj vastaj regionoj malaperas...

Spina, etruska komerca urbo priparolita de Pline kaj Strabon, hodiaŭ tute malaperis en Adriatiko. Dioskurias vizitita de la Argonaŭtoj kaj Fanagorias grava haveno ĉe Maro Nigra dum la helena periodo, estas nun sub la akvoj. En la 2-a duono de la 19-a jarcento, la insulo Tuanaki en arkipelago Cook malaperis kun siaj 13 000 loĝantoj ; en la mateno la fiŝistoj estis foririntaj el la insulo ; kiam ili revenis en la vespero, ne plu estis insulo. En Jamaiko, Port-Royal, kiu longtempe estis ŝirmejo por la piratoj parte subakviĝis en 1692.

Ĉiun jarcenton, Francujo enprofundiĝas je 30 centimetroj.

... kaj reaperas aŭ leviĝas

La templo Jupiter-Serapis estis konstruita en la golfeto de Napolo, en 105 ant. K. ; iom post iom ĝi enprofundiĝis en Mediteraneon ; en 1742, ĝi eliris el la akvoj, en kiujn ĝi denove enprofundiĝas. En 1135 oni konstruis la fortreson Caravan Saraï sur insuleto de Kaspia Maro ; laŭlonge de la generacioj ĝi malrapide malaperis en la akvojn ; en 1723 la insuleto leviĝis super la maro ; hodiaŭ, tie, ĝi ankoraŭ estas. La Insulo de la Falko estis malkovrita de hispana esploristo ; en 1892 la registaro de Tonga plantigis 2 000 kokosujojn ; sed 2 jarojn pli poste, la tuta insulo estis malaperinta en la oceano ; nun ĝi komencas leviĝi.

Ĉu Atlantido ?

Ne malpli ol 25 000 libroj jam traktis tiun temon kaj lokis tiun kontinenton en tre diversaj regionoj : Mediteraneo, Sahara, Helgolando, Mezorienta Azio, Irlando, Bahamoj...

Tamen, en 1678, Frato Kirker proponis, ŝajne, la plej solidajn bazojn de la moderna Atlantologio. Li certigis ke Kanariaj Insuloj kaj Acoroj estas la elmergitaj suproj de la malaperinta kontinento, kiu estus etendiĝinta inter la bordoj de okcidenta Eŭropo, nord-okcidenta Afriko kaj sud — kaj — centra Ameriko. Tiu hipotezo plene koincidas kun la mencioj de Platon-o en siaj Timeo kaj Kritias ; sendube laŭ la riveladoj, kiujn la egiptaj pastroj faris al Solon, la Atena leĝisto (inter 570-560). Platono skribis : « Transe de tio, kion oni nomas hodiaŭ « la kolonoj de Heraklo » troviĝis granda kontinento nomita Pozeidonis aŭ Atlanta ; ĝi estis longa je 3 000 stadioj kaj larĝa je 2 000 stadioj ; ĝi estis pli granda ol Azio kaj Libio kunligitaj ; el tiu kontinento oni povis iri en aliajn insulojn, kaj el tiuj insuloj al firma tero ; tiu firma tero ĉirkaŭis la maron, kiun oni nomas Atlantiko ». Diversaj scienculoj pensas, ke tiuj insuloj estas Antiloj, ke la firma tero estas Ameriko.

Ankaŭ la Meksikiaj legendoj parolas pri malaperinta kontinento, kiu situis « Tie, kie la suno leviĝas kaj kie estas nur akvo ». La Aztekoj nomis ĝin Aztland. La hodiaŭaj Nohua-oj elvokas la Grandan Landon, kiun fajro kaj maro detruis.

Ankaŭ la Hindiaj tekstoj de Mahabharata rakontas pri Granda tre potenca Lando, kies situo estis la aktuala Atlantiko kaj pri ses grandaj Insuloj, kies ĉefurbon detruis la armeo de Brahma. Ĉu Atlantido estis vera kontinento aŭ arkipelago ? La nuntempaj scienculoj preferas tiun lastan hipotezon.

Ĉu unu mondo ĉe fundo de Atlantiko ?

Sciencaj pruvoj ekzistas por certigi la ĉeeston de subakvigita kontinento funde de Atlantiko. Profesoro Zirov kaj multaj sovetaj serĉistoj akceptas la hipotezon de Atlantido en tiu oceano. Ili konsideras, ke Atlantiko estas la plej juna el la oceanoj, kaj ke ĝi estis teatro de violenta vulkana manifestacio. En kiu ekzakta loko troviĝis Atlantido ? Ekaterina Khagemeister pensas, ke la kontinento estis iamaniere ligita al la submara platafo, kiu, hodiaŭ, portas Acorojn. La lastaj oceanografiaj esploradoj aperigas grandan similecon inter la topografio de Acoroj kaj tiu de la Atlandido priskribita de Platono. Laŭ Platono, Atlantido estis montara lando. Do, en Atlantiko devas troviĝi subakvigitaj montoj. Fakte la oceanografiaj observadoj montris, kun certeco, la ekziston de giganta montara sistemo, kiu, centre de Atlantiko, etendiĝas de unu polusa cirklo al la alia ; tiu montara sistemo prezentas kontinuo-rompon en la ekvatoria zono. Tial oni parolas pri 2 monto-ĉenoj ; la nordatlantika ĉeno kaj la sudatlantika. Laŭ P-ro Zirov, la nordatlantika ĉeno, kie troviĝis Atlantido, konsistas el 2 paralelaj montaroj inter kiuj estas mallarĝa kaj profunda ebenafo. Platono parolas pri tiu ebenafo, ĉirkaŭita de altaj montoj.

En 1913, la franca geologo P. Termier certigis, ke la peco de vitrigita lafo, kiun oni trovis en la oceano, norde de Acoroj, estis povinta solidiĝi nur en libera aero ; en 1934, aliaj roko-elprenitafoj, fosilioj de bestoj kapablaj vivi nur en libera aero, kaj fosilioj de dolĉakvaj algoj konfirmis lian deklaron.

Kaj okazis la plej sensacia malkovro ; ĉu pladoj ?

Sur unu el la submaraj montopintoj (nomita Atlantis, pro la nomo de la esplorada ŝipo) oni trovis unu tunon da strangaj kalkaj diskoj (diametro 15 cm. — dikeco : 4 cm.). Ili montras facon preskaŭ glatan dum la alia havas kavafon en sia centro. Ilia aspekto pensigas, ne pri natura deveno, sed pri artefaritafo. La karbon-metodaj observadoj rivelis, ke, antaŭ 12 000 jaroj, tiuj diskoj troviĝis en libera aero. Do « la submara monto, en tiu ĉi epoko, estis kontinento ».

La katastrofo

La aŭstria geologo Otto H. Much opinias, ke, « En 8496 antaŭ Kristo, planedoido, kies maso atingis 200 miliardojn da tunoj, — pro tre rara konjunkcio de Tero, Luno kaj Venuso — forlasis sian orbiton kaj falis sur nian Teron. Tiu evento ŝanĝis la rotacian akson de la terglobo kaj okazigis enormajn detruojn, revoluciigante la geografiojn ».

Multaj scienculoj akceptas tiun aserton, kvankam ili ne samopinias pri la dato de la evento. Oni imagas la falegon de tiu ĉiela korpo, ĝian disrompiĝon en 2 pecojn, ĝian plonĝon en Atlantikon kaj kiamaniere ĝi frapis la Teran kruston. « Kun terura bruo, diras la geologo H. Fisher, fajro-kolono ŝprucis al la ĉielo, kuntrenante kun si gasojn, cindrojn, lafojn, « lapilli-ojn », titanajn masojn de fandiĝanta magmo. La maro ekbolis : neimagebla kvanto da akvo transformiĝis en vaporon, kiu miksiĝis kun polvo kaj cindro kaj densiĝis en nigrajn nebulojn kiuj obskuris la ĉielon. Kaj ĉiuj vulkanoj eksplodis en apokaliptika furiozo ».

La fal-punkto de la du kosmaj ŝtonoj situas centre de la arko, kiu iras de Florido al Antiloj. La zono rekte trafita estas tiu, kie la dikeco de la Tera krusto estas 15-20 kilometra dum alie ĝi atingas 40-60 km. En la sama momento tiu spaca bombado kavigis enormajn kraterojn sur la tuta amerika kontinento kaj funde de Atlantiko ; ili okazigis la Niagara-kaskadegojn kaj igis Andojn unu el la plej grandiozaj montaro-ĉenoj de nia Terglobo.

Fakte oni rimarkas sur Andoj, en diversaj lokoj, je altitudo 3 500 metra, blanketajn striojn, kelkfoje sen interrompo, laŭ pli ol 500 km. ; ili estas maraj sedimentoj, kiuj nediskuteble pruvas, ke, iam, tiuj regionoj estis banitaj de la oceano. Cetere, supre de vertiĝdonaj pintomontoj oni vidas strangajn konstruaĵojn kompareblajn al havenaj instalaĵoj. Plue, antaŭ 150 jaroj, la fama germana naturalisto A. von Humbolt malkovris (apud Bogota, je 2 650 m super la maro, sur la dezerta plataĵo nomita Kampo de la Gigantoj) ostojn de mastodontoj ; tiuj mamuloj estas najbaraj de la mamutoj ; pasintece, ili estis multnombraj en certaj regionoj de Eŭropo, Azio kaj nord-Ameriko. Tiu malkovro ege surprizis Humbolt. Ja, tiuj bestoj ne povis vivi tiel altitude kaj en tiu ĉi halucina medio ; certe, iam, tiu regiono estis marĉa zono kun riĉa vegetalaro.

Do, sendube, katastrofo, de neimagebla amplekso, portis Andojn ĝis ilia aktuala altitudo.

La Diluvo


Alia rezulto de tiu katastrofo estas la Universala Diluvo priskribita, ne nur en Biblio, sed en diverslandaj rakontoj. Vladimir Obroutchev, Ekaterina Khagemeister kaj ankaŭ la sveda atlantologo, Rene Malaise esprimis la saman opinion. Ili pruvis, ke, kiam Atlandido ankoraŭ ekzistis, ĝi malebligis la iradon de la varmaj akvo-fluoj al Eŭropaj bordoj. Post ĝia enabismigado, Gulf Stream atingis Eŭropon kaj iom post iom okazigis la degeladon de la glacioj. Laŭ la rimarkoj de la soveta hidrografo S-ro Armolaev, evidentiĝas, ke la aktuala akva reĝimo en Artiko organiziĝis antaŭ ĉirkaŭ 12 000 jaroj. Multaj kontroladoj, fare de la izotopa metodo, certigas, ke tiu dato koincidas kun tiu de la fino de la Glacia Periodo ; 12 000 jaroj estas ankaŭ la proksimuma dato indikita de Platono por la malapero de Atlantido.

Jen la sumera priskribo de Gilgamesh

« La Tempo venis, kiam la Sinjoroj de la Tenebroj faligis teruregan pluvon... Kiam la mateno venis, tre nigraj nuboj supreniris al la ĉielo ; ĉiuj Malbonaj Spiritoj furiozis ; la tuta heleco estis ŝanĝita en obskurecon ; la suda vento muĝis ; muĝegis la fluantaj akvoj, kiuj jam atingis la plej altajn montojn kaj falegis sur ĉiujn naciojn. Dum ses tagoj kaj ses noktoj la pluvo falis kiel kaskadego. En la sepa tago la diluvo kvietiĝis... Silentiĝis kiel post batalo ».

Transe de la oceano la memoro de tiu katastrofo ankoraŭ vivas. La brazilana filologo O.M. Bolio ĝin elvokas laŭ Maja teksto tradukita en 1930. « En la 11-a tago, okazis la Malfeliĉo. Furioza pluvo falegis ; el la ĉielo ankaŭ falis cindroj kaj, en unu nura ondo, la akvoj de la maro sin ekĵetegis sur la teron... kaj la ĉielo falis, kaj la firma tero enprofundiĝis kaj la Granda Patrino Seyda restis inter la memoroj pri la detruo de la mondo ».

La Biblia historio de Noa ankaŭ troviĝas en Ameriko. Jen la Azteka rakonto al kiu eĉ ne mankas la kolombo : « En la valo de Meksikio vivis pia viro nomita Tapi. Iun tagon la Kreinto de Ĉio montriĝis al li kaj diris : Tie ĉi konstruu grandan boaton kaj igu ĝin cia domo ; lokiĝu en ĝin cia edzino unu paro de ĉiuj vivantaj bestoj ; sed hastu, ĉar la Tempoj estas proksimaj. Tapi obeis malgraŭ la insultoj kaj la mokoj de siaj najbaroj, kiuj opiniis lin



freneza. Apenaŭ li estis fininta sian taskon, ke la pluvo komenciĝis ; seninterrompe pluvis ; la valo malaperis sub la akvoj ; la homoj kaj la bestoj serĉis refuĝon sur la montoj sed ankaŭ tiuj ĉi estis subakvigitaj. Nur la boato de Tapi ŝirmis vivantajn estaĵojn. Kiam la pluvo ĉesis, kiam la suno denove brilis, kiam la akvoj malleviĝis, la pia viro ellasis eksteren la kolombon. La kolombo ne revenis kaj la koro de Tapi ĝojiĝis ; certe la besteto estis trovinta iom da firma tero por halti ».

En Grekujo, la mitologio gardas la memoron de Faeton-o. Li estis filo de Suno ; li jungis la ĉaron de sia patro ; sed li ne kapablis laŭiri la ĝustan vojon ; li falis sur la Teron, ĉion bruldifektis kaj li mem mortis fulmbatita.

En Egiptujo, sur la plafono de la tombo de Senmouth — kiu estis la arkitekto de la reĝino Hatshepsut — troviĝas du mapoj, kiuj reprezentas la ĉielan volbon ; Sur unu el la mapoj, la ĉefpunktoj estas nunaspekte lokitaj, dum sur la alia ili estas renversitaj, kvazaŭ la Tero estus ricevinta skuon. Egiptaj papirusoj, nun en la Muzeo de Leningrado, mencias tiun returnon de la Tero kaj la falon de aerolito. Papiruso maljuna je 3 000 jaroj citas la Insulon de la Serpento kaj raportas la jenajn parolojn : « Kiam vi forlasos mian insulon, vi ne plu retrovos ĝin, ĉar tiu loko estos malaperinta sub la akvoj ».

Ĉu la Atlantidanoj antaŭvidis la Katastrofon ?

Ĉu kelkaj el ili povis forveturi en aliajn landojn ?

Tia estas la demando. Responde, ni povas nur elvoki la sciencajn sciojn de la Egiptoj kaj supozi, ke ili ricevis tiujn sciojn de antaŭa tre evoluiĝinta civilizacio.

La nomo de Atlantido lulas niajn revojn. Kie, certece, ĝi kuŝas ? Verŝajne en Atlantiko. Sed multaj aliaj verkoj proponas al ni aliajn lokojn, kiujn ili montras pli taŭgaj.

RUBENS

Antaŭ kvar jarcentoj (la 28an de junio 1577) naskiĝis P. P. Rubens kiu, poste, famiĝos kiel « la pentristo de Antverpeno ». Tamen, mirinde estas, ke li ne naskiĝis en tiu urbo, sed en la germana Vestfalio. Lia familio, burĝdevena kaj sufiĉe riĉa, ludis gravan rolon en la ekonomia vivo. Nur je la 12a jaro li, unuafoje, envenas en Antverpenon, post la morto de sia patro. Du jarojn poste, la juna Rubens komencas lerni pri pentrarto. Pri tiuj jaroj oni nenion precize scias koncerne la evoluon de la estonta geniulo. Sendube li zorge poluras siajn artajn kapablojn.

ITALA ALVOKO

En 1600, li vojaĝas al Italio. Tia vojaĝo estis jam klasika kaj tradicia por la junaj eŭropaj artistoj kiuj ne sentis sin kompletaj se ili ne estis sučintaj, dum pli malpli longa tempo, la inspiron en la Eŭropa fonto de la Renesanco.

Por multaj tiu vojaĝo al la inspirofonto iĝis fatala, ĉar ili perdis ĉian originalecon, kaj droniĝis en la kopiado de modeloj por ili fremdaj, rilate ilian naskiĝdevenan kulturmedion. Rubens transpaŝos tiun pasivigan vojon kaj, plensukcese, kunigos la du kontraŭdirajn mondojn ; la Nordon kun ties vigla potenco kaj energio, kaj la Sudon kun ties formala kaj klara ordigado.

En Italio, kvankam dungito de la Duko de Mantuo, Rubens elektas la restadon en Romo, kie la fajroj de la Renesanco elĵetas la lastajn rebrilojn. En 1603 la pentristo, komisiita de lia duka moŝto, vojaĝas al Hispanio sed, post iom da tempo, li klopodas rapide retrovi la ĉarmojn kaj plezurojn de la papa Urbo, malgraŭ la insistaj petoj de lia dunginto por ke li restadu en Mantuo. En 1608, profitante malbonajn sciigojn rilate la sanstaton de sia patrino, nia pentristo, duonkaŝe de la Duko, forlasas Italion. De nun li iros propran vojon. De tiu itala periodo restas kelkaj pentraĵoj, en kiuj la influoj de la renesancaj majstroj aperas, iom preterigante la personajn trajtojn.

BIBLIAJ KAJ MITOLOGIAJ TEMOJ

Tiam, reveninte Antverpenon, Rubens komencas vivon en kiu famo kaj gloro interplektiĝos ; liaj verkoj rapide sinsekvos. La ĉefaj temoj estas ofte religiaj, « La starigo de La Kruco », « L'Adorado de l'magoj », « La Dekrucumigo ». En tio percepteblas la rezulto de la kontraŭ-Reformacio kiu riproĉinte al la Luteranoj kaj Kalvinanoj ilian severecon, celas elmontri la artaprezon kaj toleremon de la romkatolikaj instancoj.

Aliflanke, la humanisma etoso ebligas inspiron rilate la antikvajn kulturojn kaj ties mitologiojn. Tion nia pentristo uzas kaj eluzas, reprezentante infanojn, homojn kaj ĉiaspecajn bestojn. En ĉiuj la vivo kaj la potenco disvolviĝas en plena libereco kaj plenigas multajn pentraĵojn.

TIPA MODELO DE VIRINO

Temo ofte aperanta estas la virino eterne juna kaj ofte senvesta. Diinoj kaj nimfoj ĉiame nudas. Rubens, ĝissate, bildigas multajn tiajn nudulinojn. Li ŝajnas fidele reprodukti la saman idealan modelon : rondecajn konturojn, vivfajrajn okulojn, rozblankajn haŭtojn, plenŝtopitajn volumojn, kio faras tuj rekonebla pentraĵon lian.

La pentristo ankaŭ emas reprodukti bestojn kaj ĉasbildojn, tiam li povas montri sian ŝaton koncerne la naturon kaj ties fortojn, la movojn de la vivo kaj la dissplitiĝon de la energio. Inter ĉio la ĉevaloj ricevas favorajn pritraktojn kaj konstantajn zorgojn ; ili aperas ĉiam en majestaj sintenoj kaj vivoplenaj movoj.

PENIKO KAJ POLITIKO

Krom la pentrarto, sed malpli konata, lia plej ŝatata aktivaĵo estas la politiko. Tiuepoke, la rilatoj inter Hispanio kaj la tiamaj Unuiĝintaj Provincoj ne estis ĉiam pacaj, kaj Rubens profitante sian ĉie rekonitan gloron, klopodas refirmigi la pacon. Li do vojaĝas al Holando, tamen sensukcese. Poste li iras al Parizo, vokita de la reĝino Maria de Medici, oficiale por pentri grandiozan galerion en la ĵus konstruita Palaco de Luksemburgo, duonoficiale por glatigi la rilatojn inter Richelieu kaj la hispana kortego. En Parizo li amikiĝas kun la Duko de Buckingham, la favorato de la anglaj reĝoj ; tiu povos montriĝi utila en la estontaj rilatoj inter Hispanio kaj Anglio.



Post la restado en Parizo, Rubens vojaĝas al Hispanio, tie li pentras kaj politikumas. Li sukcesas interesigi la tiaman reĝon, kaj ricevas komision por la angla kortego. En Londono li ankaŭ politikumas kaj pentras. Sed, se ĉie liaj talentoj kiel pentristo estas unuanime agnoskitaj, liaj politikaj klopodoj pli malpli fiaskas. Amarkore, li revenas en Antverpenon por reedziĝi post la morto de la unua edzino : la nova S-ino Rubens estas 16-jara, la pentristo 53.

LA SUNSUBIRO...

Dum la lasta jardeko li uzas la tempon por produkti ĉiam pli poluritajn verkojn, kie la koloroj, la movoj, la sintenoj ŝprucigas la ĝojon kaj la vivon. Rubens, jam de longe riĉa, pli kaj pli riĉiĝas ; lia domo en Antverpeno estas unu el la plej belaj — se ne la plej en tiu komerca riĉa urbo. Krome, li akiras kastelon en provinco Brabanto, en kies ĉirkaŭanta pejzaĝo li serĉos inspirojn : potencajn ĉielojn, trankvilajn boskojn, mildajn riverojn.

La 30 an de majo 1640, en Antverpeno, la maljuna mano, kiu tiele sciis enmovigi la kolorojn kaj enlumigi la gestojn, senmoviĝas, la okulo elfajrigas la lastan rigardon, kaj teren falas la magia peniko.

R. LLOANCY.

KAROLY SZAKONYI

Ĉiu rapidas hejmen

Jus ni volis fermi la espreson, (kafejo) ĉar de tagmezo apenaŭ ĝi estis frekventita ; senfare mi staradis ĉe la pordo rigardante tra la kurteno la straton, la bushaltejon ; tra la diafana, blanka kurteno la ŝoseo kaj la ĉirkaŭaĵo tiel ŝajnis kvazaŭ neĝus, kvankam dum tagoj la vetero estis griza kaj malpura. La nebulo leviĝis de sur la rivero. El la elbusiĝintoj neniu envenis por trinki bieron aŭ nigran kafon, kiel alifoje, oni trairis la straton direkte al la domoj kun pakaĵoj envolvitaj per la magazenaj pakpaperoj. Iuj nur nun penis pri porto de la pinarbo. Ili estis miskreskaj pinarboj, kiuj vendiĝis nur la lastan tagon. Mi aĉetis jam antaŭ du semajnoj mian pinarbon sur la vendoplaco, mi ĝin ŝnurligis sub la fenestron de nia loĝejo sur la kvara etaĝo ke ĝi estu tie en malvarmo. Nur ĉi-matene mi portis la arbon en la ĉambron, ke mia edzino ornamu ĝin. Oni devas antaŭzorgi pri ĉio. Ĉi tion mi jam eklernis. Mi travivis jam kelke da jaroj, la vivo alkutimigis min ĝustatempe aĉetakiri ĉion, kion mi bezonas. Mi ne ŝatas la hastadon kaj la malcertecon, eĉ se temas pri etaj aferoj.

Hieraŭ mi elprenis la kolorajn elektrajn bulbetojn tre komforte el ilia pasintjara skatolo. Vespere vizitos nin miaj filoj kun la du etaj nepoj. Mi aĉetis konstrukubetojn, bildlibron, pupon, fervojeton, ĉion. Mi tre ŝatas la kristnaskan etoson, la festan vespermanĝon, mi ŝatas la parfumon de la pino en la ĉambro kaj la brulantajn kandelojn. Ni havas eĉ kripeton, en ĝi Jesueto el gipso, ĉirkaŭ li estas el gipso Maria kaj Jozefo kaj la tri reĝoj, la ŝafistoj, ĉiuj el gipso kolore pentritaj, krome gipsazeno, gipsbovino, do la tuta Betlehem ; malantaŭe, post la ruĝa celofanpapero eblas prilumi la tuton per bulbeto de poŝlampo, kaj ĉi tio estas tre bela. Mi ĉiam emociiĝas, ĉar ĝi rememorigas min pri mia infanaĝo. Poste ni aŭskultas la « Silentan nokton », Iam donace ni ricevis de mia filo la diskon, ĝin ni ĉiam gramofonludas, dume la lumdispersiloj fajreras, mi diras sincere, mi emociiĝas, ploro sufokpremas mian gorĝon, tiom mi sentas la amon. Pri ĉi tio mi pensadis, kaj pri tio, ke baldaŭ finiĝos la taglaboro ; la kafistino malklučis la kafaparaton je la kvina horo, la ĉefo kontrolis la tagan enspezon, malantaŭe en la hungareca ĉambrego ni estingis jam la lampojn, do ni ĵus volis fermi, kiam enpaŝis tiu homo.

Mi pensis, ke li trinkos ion, poste ankaŭ li rapidos hejmen kiel la aliaj.

Ne eblis konstati lian aĝon, nek aĝa nek juna li estis ; li ne ŝajnis bonhavulo, krome li havis longajn harojn ĝiŝsultre, li estis magra, maldiketa ; liaj barbo kaj lipharoj malseke kungluiĝis pro la nebulo. Li haltis ĉe la pordo, unue li rigardis min, poste la knabinon, ekbalancis sian kapon, li kuntiris sian jakon ; tiel atendante li staradis tie, kvazaŭ oni devus lin bonkore akcepti. Mi iris al la butiktablo por rapide priservi lin, se li petos ion, sed li ne ekvokis.

— Mi ne povas nun kuiri kafon — diris decide la kafistino.

— Ni ne havas kafon — mi diris al la ulo. — Ni tuj fermos. Per kio mi povas servi vin ?

— Ĉu mi povas sidiĝi — li demandis silente.

Nu, li povas sidiĝi, la espreso estis ankoraŭ malfermita. — Bonvolu — mi respondis nevolonte. Mi pensis, ke li rimarkos la situacion. Tute ne, kvazaŭ mi estus proponinta al li plej afable sidlokon, feliĉe li altabliĝis proksime al la radiatoro.

— Per kio mi povas servi vin ? — mi demandis kun urĝanta voĉo.

Milde li levis sian rigardon — nu mi tre bone konas la tiaspecajn mildajn rigardojn ! Mi vidis jam multajn strangajn tipojn, kiuj estis tiel mildaj.

— Vinon — li diris.

— Ni havas botelvinon.

— Jes.

— Sep decilitran. Abaŝari, Furmint, Knabineto.

— Ĉu ruĝan vi ne havas ?

— Ankaŭ ruĝan vinon ni havas.

— Eble tiun.

— Donu al li Kékfrankos — mi diris al la kafistino.

De sur la mura breto ŝi deprenis kaj sen forviŝi la botelon, ŝi transdonis ĝin. Ŝi paŭtis la buŝon, jen kio ankoraŭ mankis.

Mi portis surplete la vinon kun glaso kaj mi verŝis vinon al la gasto. Dume mi funde rigardis lin — li kaŝis siajn ambaŭ polmojn subaksele kaj fermokule li varmiĝis ; poste li ĵetis rigardon sur min, ridetante etendis sian manon al la glaso.

— Ĉu vi ne trinkus kun mi ?

— Mi jam reiris al la butiktablo, kiam li metis la demandon. La knabino — mi rimarkis, — estus jam emiĝinta trinki, sed mi anticipis ĝin :

— Ne, sinjoro, ni dankas.

Ĉar mi observis ion. Mi rimarkis ĉi tion, kiam li etendis sian manon al la glaso.

— Ne, sinjoro, ne ! ... — mi diris decide. Mi gestis al la knabino veni pli proksimen. Ŝi antaŭenklinis sin super la butiktablo. — Rigardu, kiaj estas liaj manoj !

La knabino ĵetis rigardon super mia sultro.

— Ĉu vi vidas ilin ?

— Io okazis al li — diris la knabino surprizite.

— Nu, jen !

Mi turnis min ; mi kalkulis je tio, ke la ulo ree metos siajn manojn subaksele. Mi eraris. Li sidis rektadorse ripozante ambaŭ pugnojn surtable, tiel videblis nek liaj mandorsoj, nek liaj polmoj, nur la kunpremitaj pugnoj.

— Mi ĝojus, se vi trinkus kun mi — li diris amike.

Mi silentis. La knabino, post mi, kubutumis sur la butiktablo. La viro nun ŝin rigardis. Nu, vi povas ŝin rigardi, mi pensis en mi mem. Ŝi ne kutimis kunesti kun la viaspecaj. Se vi vidus ŝiajn amikojn, mi pensis. Aŭ la aŭtojn de ŝiaj « knaboj ». Se vi vidus, kiuj kubutumas ĉi tie sur la butiktablo pro ŝi. Ŝi estis ĉarma knabino, antaŭ nelonge ŝi estis translokita ĉi tien el iu urbocentra espreso. Mi ne petis la kialon, ĉi tio koncernas la estrojn. Ŝi altiris la virojn per siaj profunde dekoltita, blanka pulovero kaj mini-jupo. Ankaŭ mi admiris ĉiuokaze ŝian bruston. Ŝi forte ŝminkis sin kaj tro multe ŝi elspezis por frizisto kaj kosmetikisto. Kiel ŝi kubutumis post mi, mi sentis la parfumon de la diversaj parfumaĵoj. Sed mi ne estas jam juna. Cetere tiam nenio interesis min, nur la fermohoro.

— Mi estas en tia situacio, ke mi ne povas ien iri — diris la viro.

— Ĉu vere ? — demandis sensingarde la knabino.

— Mi havas neniun. Ĉu ni ne povus pasigi kune la vesperon ?

— Kun mi certe ne — ekridis ironiete la knabino.

— Tiel mi imagas, ke ni ĉiuj, kune.

— Vi ŝercas — mi diris aŭstere.

Li ne respondis tuj. Li nur gapis kun sia pseŭdmilda rigardo.

— Ĉu vi pensas ke mi ŝercas ? Serioze mi demandis.

— Ĝuste kun vi ! — moke respondis la knabino. Cetere hodiaŭ estas Kristnasko.

— Ĉu cetere ? — demandis kun ironia akcento la viro.

— Jes, cetere ! Se vi ne scius, hodiaŭ ĉiu rapidas hejmen.

— Sed ĵus nun mi diris, ke mi povas iri nenien.

— Via zorgo !

— Ĉu vi tiel opinias ?

Al mi jam tro sufiĉis.

— Trinku sinjoro, trinku ! Se entute la trinko servas al vi bone. Rapidu, se mi povus peti vin.

— Ĉu vi volas min forpeli ?

Mi silentis, ĉar mi respondus plej volonte, ke jes ja.

— Do ĉu vi ne deziras estis kun mi ? Eĉ ne hodiaŭ ?

— Ne sinjoro, ni jam diris al vi.

Terure nervozigis nin ke li nur sidis tie kaj neniel tuŝis la glason.

— Kaj kio estu al tiuj ĝuste ĉi-vespere, kiuj ne povos iri ien ? Mi demandas vin — kaj li alrigardis la knabinon.

— Tion mi ne scias !

— Ĉu vin ne interesas ĉi tio ?

— Tute ne — ridis nervoze la knabino.

— Ĉu viaopinie, ne indas paroli pri ĉi tio ?

— Ĉi tio ne interesas min — diris la knabino.

— Do, kio interesas vin ?

— Vidu sinjoro, ni ne estas devigitaj konversacii kun vi — mi diris. — Kaj ni devos tuj fermi.

— Kien vi rapidas ?

— Li envenas ĉi tien kaj provokas nin — alrigardante min diris la knabino.

Absolute ne temas pri ĉi tio, — ekparolis ridete la viro. Lia rideto estis incita. — Mi nur volus ekscii, kiel la mondo estas aranĝita, ordigita ?

— Kaj ĉi tion ĝuste de ni ? Ĝuste je unu minuto antaŭ la fermhoro ?

La ulo silentis, sed li atendis la respondon. La knabino diris.

— Nu, bone ! La mondo estas tiel aranĝita, ke ĉiu povas prosperi. Ĉi tio estas tre bona eta mondo ! Eĉ se ĝi ne plaĉas al vi pro io, ĉu klare ? Ĝi alkutimigas onin al la lerteco. Kiu ne prosperas, tiu kulpigu sin mem. Kaj ne provoku tiujn, kiuj estas pli bonŝancaj ol vi !

— Ah, do tiel ?

— Ni ne kulpas pri tio, ke vi estas sola. Kaj se vi estas pro io malbonŝanca, ne pritraktu tion kun ni.

— Ĉar ĉi tio vin ne interesas, ĉu ne ?

— Ne diskutu kun li — mi readmonis la knabinon. Li jam staris al mi en la gorĝo. — Atentu sinjoro ! — mi paŝis pli proksimen al la ulo. — Vi povas esti nur feliĉa, ke ni ne tro interesiĝas. Mi esperas, ke vi komprenas, pri kio mi aludas ?

Jen, tiu milda rigardo ! Mi koleriĝis.

— Ĝoju, ke mi ne demandas, de kio estas sangaj viaj manoj !

Li ne surpriziĝis. Malrapide li levis sian manon kaj malfermis sian polmon.

— Ĉu vi pensas pri ĉi tio ?

Meze de lia polmo estis profunda vundo. La knabino ekŝrikis.

— Mi ne esploras, de kio ĝi estas. Kvankam mi povus fari — mi diris. — Oni multe supozas pri la viaspecaj. Mi nur petas vin, trinku vian vinon kaj iru for !

La viro eĉ ne ektremetis, li levis ankaŭ sian alian polmon.

— Ankaŭ en tio estas vundo ! — ĵetis krion la knabino. Kvankam ŝia voĉo estis timoplena, sed senteblis ankaŭ la kompato. La ulo rimarkis ĉi tion kaj kun dankema rideto li balancis la kapon. Mia toleremo estis jam sur la limoj, sed mi regis min.

— Viaj vundoj ne interesas min jam diris.

— Kvankam ili povus interesi vin.

— Mi ne volas entrudiĝi en viajn aferojn. Mi ripetas, mi nur petas vin...

— Tamen vi entrudiĝas. Nur ne tiel, kiel vi pensas.

— ...mi nur petas vin, trinku, pagu kaj...

— Ĉu vi eĉ ne konjektas, kiaspecaj vundoj estas ĉi tiuj ?

Mi sentis ke mi estas neĝblanka pro la ekscito. Ĝuste tio mankis ! Mi devigis gardi mian trankvilon.

— Ne, sinjoro. Eblas, ke vi vundiĝis nur hazarde. Sed eblas ankaŭ tio, ke vi kulpis ion kaj tiuj vundoj ne hazarde estiĝis...

— Ĉu ili doloras ? — demandis nun la knabino multrankvile. — Ĉu ni ne povus fari ion ?

Mi alrigardis la knabinon : — Ni ne vidis ĉi tiujn vundojn ! Li ne enmiksos nin en ian aferon.

Mi sufiĉe laŭte parolis ke la ĉefo envenu el la kontoro.

— Kio do estas, mi petas ?

— Nenio — mi diris tiavoĉe, ke la ĉefo povis kompreni ke mi volas lin teni flanke de ĉi tiu konfuza afero. — La sinjoro jus volis pagi kaj li foriros. Ni fermos.

— Jes, ni fermos — ripetis maŝine la ĉefo.

Li ĵetis rigardon sur la gaston ekvidante la ankoraŭ levitan vunditan polmon de la ulo. La vorto forsvenis sur liaj lipoj. — Ĉu la glaso ?...

— Ne, ĉefo, nenio... Mi flankentiris lin kaj rapide rakontis ĉion. Li plurfoje ĵetis okulon al la ulo, dum mi informis lin, kaj abrupte li ekprenis mian jakon.

— Rigardu tien ! Ankaŭ lia ĉemizo... Ĉe lia flanko !

Turnante mian rigardon, ankaŭ mi mem vidis ĝin ; la viro malfermis sian jakon kaj aperis lia ĉemizo kaj surĉemize ruĝa makulo.

La ĉefo signe vokis al ni la knabinon.

— Ni devus telefoni al la polico.

— Nun ? Ba ! — mi kvietigis lin. — Ili ne tre ĝojus, ke ĝuste nun... vi scias. Vespere de Kristnasko... krome ankaŭ ni estus ĝenataj. La familio jam atendas nin... Diablo forportu, ke li envenis ĝuste ĉi tien !

— Bone — diris la ĉefo. — Ĉi-kaze ekspedu lin for plej baldaŭ.

Li rapidiris en la kontoron.

Mi kaj la knabino, ni reiris al la butiktablo.

La ulo stariĝis, siajn polmojn ankoraŭ alte tenante ; nun bone videblis ankaŭ lia sanga ĉemizo.

— Ĉi tiuj vundoj — li ekvoĉis milde, sed la knabino ekŝrikis.

— Iru for de ĉi tie !

Haste mi skribis la slipoblokon kaj tenis ĝin sub la nazo de la viro.

— Tridek du kaj kvardek ! Kaj forportu vin, ĉar ni fermas !

— Mi nur volus memorigi vin...

— Vi ne volu ion !

— En miaj polmoj, ĉe mia flanko kaj sur miaj piedoj... ĉi-vespere...

— Ĝoju ke ĉi-vespere ni volas nenion scii pri viaj obskuraj aferoj ! Ĝoju, ke ĝuste tian pacan vesperon... ĉu vi komprenis ? Alifoje vi ne tirus vin el la afero ! Tridek du kaj kvardek kaj adiaŭ !

La ulo retroiĝis, fine li mallevis siajn polmojn. Li metis la monon sur la tablon. Silente ni atendis. Mi ne volis lin perforte eljeti, kvankam mi staris jam sur tiu punkto. Li retroiris ĝi la pordo. Ni staris ĉe la butiktablo, kaj li nur gapis al ni daŭre kun sia milda, petega rigardo. Tiam mi pensis ke li diros denove ion, ĉar liaj lipoj fojefoje ektremetis. Sed li senvorte eliris.

— Nu, ni rapidu malsuprenigi la rulkurtenon — mi diris.

La knabino helpis al mi ĉion meti en ordo. El la botelo mankis nur tiu decilitro, kiun mi elverŝis. Ankaŭ tio restis en la glaso.

— Ĉu li foriris ? — demandis la ĉefo.

— Eĉ la vinon li ne eltrinkis — montrante al li la glason.

— Morgaŭ ni vendos ĝin — la ĉefo korkis la botelon kaj metis ĝin en la fridujon.

— Estis momento, kiam mi ekkompatis lin — diris silente la knabino.

— Jen via pensmaniero, Veronika — ridis la ĉefo. — Vi kapablas kompati eĉ tiajn ulojn.

Pri ĉi tio ni bone ridis, post la ekscito ni bezonis la ridon. Ekstere estis naŭza nebulo. Ni sidiĝis en la aŭton de la ĉefo ; la knabino sidis antaŭe, mi sur la malantaŭa sidloko. Forlasinte la parkejon, mi kaŝobservis el la aŭto, ĉu mi vidas ie la ulon. Sed tiu malaperis. Senspure li malaperis, ĉar mi lin nenie vidis.

Nu, poste en la bone hejtita aŭto mi iĝis iom pli trankvila.

El hungara : D-ro Istvân Nagy.

Polica enketo

La garaĝo situas je 6 km. de Orleans sur la strato al Parizo. La garaĝisto telefonas al la policejo : « Hieraŭ vespere, je la 23-a mi havis strangajn klientojn : granda malhela aŭtomobilo haltis antaŭ la benzino- pumpilo ; nur ĝiaj lampetoj lumis ; korpulenta viro eliris el ĝi kaj petis de mi 30 litrojn da benzino ; ĵus kiam li finpagis min, virino svingis sian manon kaj kriis : « Helpu ! Helpu al mi ». Plej rapide la aŭtomobilisto foriris direkte al Parizo. Mi apenaŭ vidis, malantaŭe, du siluetojn, viron kaj virinon ; mi memoras nur parton de la identiga plato : 64-75. »

La ĝendarmoj enketis pri tiu aŭtomobilo kaj trovis ĝin ; ĝi apartenis al S-ro Norbert, advokato en Orleans. Oni demandis lin, pri tio, kion li faris la 1-an de oktobro, en la vespero. Kun sia edzino, li estis vizitanta, kiel ĉiusemajne, siajn amikojn Varnel kun kiuj ili kutime kartludis, ĝis proksimume je la I-a matene. Je tiu horo, ili retrovis sian veturilon, en la sama loko, rande de la trotuaro. Tamen Sinjorino Norbert rimarkis : « ĉu vi plenigis la rezervujon ? ŝajnis al mi, ke ĝi estis preskaŭ malplena. Ne, mi ne aĉetis benzinon. Oni devis konkludi, ke iu prenis la veturilon dum la vespero, kaj timante benzino-paneon, plenigis la rezervujon. Ĉar la veturilo estis ĉi tie je la I-a matene, ĝi certe faris nur mallongan vojaĝon.

Tri semajnojn pli poste du ĉasistoj, laŭirante la riveron, malkovris kadavron kaj revolveron inter la kanoj. Oni facile rekonis tiun korpulentan viron. Li estis S-ro Lurignan, kiu loĝis kun sia edzino kaj sia bofratino, en ekstera kvartalo. Oni bone konis lin. Li reprezentis firmaon pri dentistaj aparatoj kaj produktoj ; li vojaĝis en tuta Francujo ; la revolvero portis neniun fingro-premaĵojn.

La polico-komisaro petis Sinjorinon Lurignan, ke ŝi bonvolu rekoni la kadavron ; ŝi svenis kaj ŝia fratino, Beatrica, 19-jara ne ĉesis plori. Ili ne sciis, kio okazis. Jen tio, kion ili eksplikis. S-ro Lurignan, ne tiel frue atendite, revenis aviadile el Italujo, ĵaŭdon, la I-an de oktobro, por la tagmanĝo. Post la vespermanĝo, li urĝe foriris por iri al Montauban, kie klientoj atendis lin. Kutime liaj vojaĝoj daŭris 2-3-semajnojn. Ne, li ne telefonis kaj nek skribis ; oni nenion ricevis de li. Li adoris sian edzinon kaj oni ne konis al li amantinon. Nenion specialan oni sciis pri Beatrica. La komisaro decidis telefoni al la ĉefa dentisto en Montauban « Ho, diris tiu ĉi, mi ne scias, kio okazis, kutime li regule vizitas min ; sed ĉi-foje li multe prokrastis sian vojaĝon ĉi tien ; ĉar mi bezonis tion, kion mi mendis al li lastan fojon, mi du fojojn skribis al li ; li ne respondis, nek venis.

La ĝendarmoj denove ekzamenis la bordon de la rivero tie kie oni estis trovinta S-on Lurignan. Subite ili ekvidis manon, kiu eliĝis el inter ŝtonoj. Ili rapidis al la ĝendarmejo. Kaj oni trovis duan kadavron ; oni ne konis lin sed en lia poŝo estis liaj identig-kartoj ; li estis Rolando Moss, 30-jara el Lille. Oni telefonis al Lille. Rolando Moss kaj lia patro estris ŝpinejon. Jam la patro estis signalinta la malaperon de Rolando, kiu estis foririnta por Alzaco antaŭ 3 semajnoj. Neniu vidis lin en Alzaco, oni se sciis, kie li estis.

La fiŝad-gardisto laŭlongis la riveron, kiam larĝa malhela makulo haltigis lian rigardon. Li ĝin signalis al la policejo. Tuj venis la plonĝistoj kaj ili elakvigis la dikan veturilon de Sro Lurignan.

Oni estis retrovinta la du virojn, la aŭtomobilon. Kie estis la virino ? Kaj kiu estis ŝi ?

La komisaro decidis fari novan viziton al S-ino Lurignan kaj Beatrico.

« — Jen, li diris, tio, kion mi opinias :

En la unua de oktobro, S-ro Lurignan, suspektema, ne tiel frue atendite, revenis aviadile el Italujo. Li ŝajnigis urĝe foriri al Montauban ; sed, je la 22-a vespere, li kaŝe revenis ĉi tien kaj eniris en la ĉambron de la virino, kiun li ĵaluze amis. Fakte li trovis, en tiu ĉambro S-ron Rolando, la amanton de tiu virino. Li ĵetiĝis sur lin kaj lin strangolis. Sub la menaco de sia revolvero, li devigis la virinon lin akompani. Por ke ne estu postsignoj en sia propra aŭtomobilo, li ŝtelis veturilon, tiun de la advokato. Li devigis la virinon sidi malantaŭen, apud la kadavro. Por eviti benzino-paneon li devis preni benzinon ĉe la garaĝisto ; tie ĉi la virino kriis, sed estis tro malfrue. Li kondukis ĝis la rivero ; dum li eltiris la kadavron kaj lin ĵetis en la kanojn, ŝi sukcesis preni lian revolveron kaj mortigis S-ron Lurignan ; ŝi lin kaŝis sub ŝtonoj kun la revolvero, kiun ŝi antaŭe viŝis. Rapide ŝi rekondukis la veturilon de la advokato ĝis rando de la trotuaro, kuris al la parkejo, kie estis la aŭtomobilo de Lurignan, kondukis ĝin ĝis la rivero kaj ĝin mergis. Rapide farita, ĉu ne, Beatrica ? ĉar estas vi, Beatrica, kiun S-ro Lurignan amegis, estas vi, kiu estis la amantino de Rolando, vi, kiu mortigis Lurignan ».

Je tiu momento ĝendarmo ekfrapis ĉe la pordo kaj alportis urĝan leteron. La komisaro rapide legis.

« — Ho ! Beatrico, mi petas pardonon de vi. Mi eraris. En Lille en la ĉambro de Rolando oni trovis fotojn kaj leterojn. Ili estis subskribitaj de vi Sinjorino Lurignan ! »


POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Krucvort-enigmo :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1	L	A	K	V	I	N	D	E	K	S	E	P	A
2	A	P	R	I	L	■	U	■	R	E	G	A	L
3	G	E	I	D	O	J	■	R	O	M	A	N	O
4	U	R	S	■	O	A	Z	O	N	■	L	I	P
5	N	I	■	G	■	V	O	K	■	A	■	K	A
6	O	■	O	R	T	O	D	O	K	S	A	■	T
7	■	T	R	I	A	■	I	■	R	E	N	O	■
8	K	■	A	P	O	K	A	L	I	P	S	■	T
9	E	M	■	O	■	O	K	A	■	T	■	S	I
10	M	A	L	■	T	R	O	M	B	■	M	I	L
11	I	R	O	N	I	O	■	P	A	D	E	L	I
12	A	D	R	E	M	■	N	■	C	I	R	K	O
13	■	E	N	K	O	P	E	N	H	A	G	O	■


Niaj legantoj ja scias ke la Universala Kongreso ne okazos en Kopenhago en 1978. Ili certe dividis en kiu jaro tiu Kruc-vort-enigmo estis verkita.



NOVA PROBLEMO

Krucvortoj (proponitaj de S. Bourot)

(S.F. = sen finaĵo)



Horizontale :

1) Ĉiuj mondoj ellaboritaj de Dio.

2) Povas esti naciaj aŭ internaciaj.

3) Negacio. — Ĝi malsanigas la plantojn (S.F.).

4) Plaĉe aŭ ŝate. — Sufikso por formi la nomojn de la enzimoj (S.F.). — Korinklina al iu (S.F.).

5) Ĝia rondvizitado kelkfoje estas longa.

6) Detale instrui. — Epoko de la universo.

7) Instrumento por disfibrigi la kanabajn tigojn (S.F.). — Vi kaj mi. — Persona pronomo.

8) Sufikso de la pasiva prezenca participo (S.F.). — Povas esti klara aŭ nigra.

9) Kelkaj filmoj estas persataj nur al ili.

Vertikale. :

1) Reto de kondukiloj (S.F.).

2) Havante sufiĉe da tempo, li multe laboras por Esperanto.

3) Malgranda (S.F.). — Nano aŭ pigmeo (S.F.).

4) Apartenanta al iu. — Per ĝi oni formas la nomojn de familio (S.F.). — Juna naskito de... (S.F.).

5) Tropika arbo.

6) La rolo de la klaŭno. — Laŭ ia maniero.

7) Eklezia tribunalo en Romo (S.F.). — Permesas ĉiujn revojn. — Orelo (S.F.).

8) Bedaŭrinde ! — Ringforma insulo (S.F.).

9) Li agas kiel alkalaj metaloj.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

LA ADVERBO

LA ADVERBO esprimas ideon (pri loko, tempo, maniero) karakterizantan.

Agon aŭ alian Kvaliton.

Tial ĝi akompanas verbon, adjektivon aŭ alian adverbon.

— Ŝi tuj kantos ; li multe elspezis, mi morgaŭ revenos hejmen.

La Adverboj estas tre diversaj.

LA PRIMITIVAJ ADVERVOJ :

La Tabel-adverboj (ie, iam, ial, iel, iom) el kiuj oni povas fari : tie, kie, ĉie, nenie ... tiam, K.T.P.

— ili ĉi tie loĝis, mi ĉiam akompanis lin, ili ĉiel klopodis.

La aŭ-adverboj (almenaŭ ankoraŭ, apenau kvazaŭ, preskaŭ, baldaŭ...)

— mi ĝojas, ke vi post-morgaŭ revenos.

La unusilabaj adverboj (ajn, eĉ, tre, tro, mem, jen, nur, pli plej, des, ju, ne, for, plu)

— ju pli vi laciĝos, despli vi malsaniĝos.



Ĉiama sopiro al frata animo :

— Mi tute ne volas perdi tempon. Mi deziras, ke vi tuj montru al mi la fraŭlojn edzigindajn.

E-ADVERBOJ

Fundamentaj E-adverboj (nepre, spite, parkere, ofte, supre, laŭte) kiuj estas fundamentaj adverbaj radikoj.

Devenantaj de verba, substantiva, adjektiva kaj prepozicia radiko (parole, dekstre, skribe, kune)

— vi tute same respondis.



Unua paŝo al geedzeca harmonio :

— Ni devas klarigi al vi, ke nia edziĝo-kontrakto mencias nepran apartigon de niaj havaĵoj. Tuj de la komenco ni volas apliki tiun tre saĝan decidon.



Ĉu diferenco ?

— Mi tute ne komprenas kial, ne sciante rajdi, vi havas spronojn ĉe viaj ŝuoj !

— Ja, certe, mia kara, vi estas tiel ĉarma, kiel plej ĉarma birdo, sed ĉu, ĉar vi havas plumojn sur via ĉapelo, vi povas flugi ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (3 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.)

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (430 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (4000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (25 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1978, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Des demandes de renseignements et des adhésions nous arrivent des cinq continents. Une fois encore, il serait bon que ceux qui ont fermement décidé de venir passer quelques semaines à Grésillon réservent leurs chambres très rapidement... et que les autres se décident vite.

L'aménagement des deux salles de cours est en bonne voie. Lorsqu'elles seront en état, il nous faudra les doter peu à peu de mobilier et de matériel convenable. Nous devrions, en deux ou trois années, équiper ces salles de quelques appareils permettant de diversifier et de faciliter l'enseignement de l'espéranto, aux débutants en particulier. Nous aurons alors une structure capable d'accueillir les responsables de cours désireux de s'initier aux méthodes modernes d'enseignement de langues vivantes. De tels stages sont indispensables. Il est dommage que les quelques essais que Grésillon a fait dans ce sens n'aient pas rencontré le succès souhaité. Il serait bon que ceux que ces séminaires intéresseraient (et ils devraient être nombreux) nous disent quelle forme ils devraient revêtir et quelle époque de l'année leur semble la plus favorable à leur organisation.

Une moitié du Conseil d'administration doit être renouvelé en 1978, à l'occasion de la prochaine Assemblée générale qui doit avoir lieu fin avril. Cinq des six membres sortants se représentent. Cinq sociétaires ont, d'autre part, répondu à l'appel à candidature. Il y aura donc dix candidats pour six postes à pourvoir. Les sociétaires recevront, avec le bilan et la convocation à l'Assemblée générale, la liste des candidats qui tiendra lieu de bulletin de vote. Une brève présentation des candidats accompagnera ces documents.

P. BABIN.

INTER NI

La aranĝo de la du kursoĉambroj iras sur kontentiga vojo. Poste estos necese ekipi ilin per taŭga instrumaterialo. Nia celo estas disponi pri ĉambroj kaj aparataro, kiuj ebligos la diversigon kaj faciligon de la instruado de esperanto. Tiam ni pli sisteme povos organizi seminariojn por Kursgvidantoj okaze de kiuj la interesatoj povos alkutimiĝi al la moderna instrumaterialo. La kursgvidantoj bonvole diru mi kiaj povus estis tiaj seminarioj kaj indiki la laŭ plej taugajn datojn en la jaro.

Duono el la konsilianoj, tio estas ses postenoj, estas renovigota okaze de la aprila Ĝenerala Asembleo. Kvin el la konsilianoj rekandidatiĝis. Kvin novaj kandidatoj enlistiĝis. Do entute dek kandidatoj por ses postenoj. Listo de tiuj kandidatoj estos sendata al la membroj de la Asocio, kun la kunvokilo al la Ĝenerala Asembleo.

Normandaj Rakontoj

de **Guy de MAUPASSANT**

Traduction de R. DUPUIS

Excellente traduction d'un chef-d'œuvre

Prix : **36,00 F.**

(rabais pour commandes en quantité)

LA REVUE

Afin d'améliorer le rythme de parution et le fonctionnement, quelques modifications vont être introduites dans l'équipe de « Kulturaj Kajeroj » au milieu de l'année.

Comme toujours en cette époque de l'année, les abonnements arrivent en foule. Merci. Nous attendons que quelques retardataires se mettent en règle pour 1977.

NOS PEINES

Madeleine Houdebine est morte. Cela paraissait impensable à ceux qui la connaissaient bien. Son activité débordante faisait oublier son âge. Ses amis, nombreux, dans le monde entier, ressentiront son absence.

***

Nous avons aussi appris le décès de Kerttu Vaitanen-Boulogne, très ancienne amie de Grésillon. Cette nouvelle attristera tous ceux qui l'ont connue.

***

Fin février, est décédé M. Jean Farjon, dont les habitués de juillet connaissaient la compétence et la discrétion. Que Mme Farjon et sa famille trouvent ici la sympathie de leurs amis.

ABONNES BIENFAITEURS

1977

P. Chevalier (44) 30
N. Epstein (06) 30
G. Chaumereuil (75) 40
L. Peraire (22) 30
S. Cuvelier (59) 30
P. Robiolle (92) 30
R. Davoust (53) 30
M. Bourrely (13) 30
A. Frangeul (49) 30
A. Debertonne (78) 30
S. Amariglis (92) 30
R. Doury (93) 30
H. Coulon (25) 30

400



ABONNES BIENFAITEURS

1978

J. Kraemer (68) 35
S. Kraemer (68) 35
M. Coussé (72) 30
A.-M. Roy (71) 30
P. Poly (75) 30
L. Chasseriaud (17) 30
J. Nagy (Hongrie) 30
R. Raynaud (30) 30
J. Comadran (04) 70
C. Duflot (59) 30
J.-P. Guillot (86) 100
P. Fort (10) 30
J. Bernard (59) 30
M. Curnier (24) 30
J. Amouroux (66) 50
G. Drezet (25) 30
G. Goudin (91) 100
F. Herbst (All. féd.) 100
E. Noël (76) 80
J. Claitte (69) 30
C. Vaubiervbiet (Belgique) 30
F. Trépier (74) 30
R. Pons (09) 30
B. Popova (Bulgarie) 30
G. Turin (25) 30
A. Boyet (49) 30
L. Robert (33) 30
L. Loyant (56) 30
R. Benazet (66) 30
C. Suchareau (75) 30
A. Aude (37) 30
S. Jacono (13) 30
F. Cadenel (13) 30
P. Bariteaud (06) 30
D. Jurquet (13) 30
C. Jurquet (83) 30
J. Villanova (13) 30
F. Garrigue (13) 30
H. Bourdelon (13) 30
R. Villégier (73) 30
J. Blanc (63) 30
D. Laporte (25) 30
Maison pour Tous, Cenon (33) . 30
A. Horault (49) 30
M. Moreau (33) 30
S. Humm (84) 30
A. Bourry (18) 30
E. Mark Edery (06) 30
M. Robert (13) 30
J. Schrapp (All. féd.) 30
M. Sujet (77) 30
M. Valluet (45) 30
E.S. Otto (Pays-Bas) 50
N. Vollegraaf (Pays-Bas) 30
J.W. Dijkstra (Pays-Bas) 30
M. de Waard (Pays-Bas) 30
P. Chatelus (69) 30
E. Stuit (17) 30
O. Verdier (75) 30
Bona Stelo (26) 30
P. Métivier (49) 30
M.J.C. Nancy (54) 30
M. Leclerq (80) 50
R. Laffargue (33) 30
M. Soulisse (14) 30
M. Sueur (62) 30
O. Bettmann (75) 30
G. Prévot (44) 30
M. Guez (Pologne) 30
M. Ligot (22) 30
R. Motto (06) 30
M. Reynaud (84) 30
H. Reynaud (13) 30
R. Stoffers (13) 30
A. Masclet (06) 30
F. Bellon (06) 30
M. Jullien (13) 30
G. Batailler (13) 30
M. Carlué (13) 30
Maison des Jeunes, Aix (13) .. 30
J. Charraz (42) 30
Esp. Klubo, St-Etienne (42) ... 30
A. Gimbert (19) 30
B. Grampp (67) 30
C. Tissot (42) 60
S. Guillot (74) 150
E. Motillon (37) 30
S. Jonas (Tchécoslovaquie) 30
J. Krdlickovo (Tchécoslovaquie) 30
B. Grimm (Tchécoslovaquie) ... 30
W. Mazur (Pologne) 30
J. Climent, Granena (Esp.) 30
J. Skotte (Pérou) 30
D. Truc (84) 30
R.-J. Marmou (77) 30
P. Pallard (72) 30
P. Friedlander (92) 30
M. Binche (37) 30
G. Clopeau (28) 30
E. Robin (92) 30
F. Chérault (75) 60
P. Lemarchand (76) 30
E. Schertzer (67) 30
R. Llech-Walter (66) 30
C. Llech-Walter (66) 30
S. Guillon (22) 30
C. Martin (35) 30
M.-L. Grisier (03) 30
J. Fort (56) 30
P. Turbellier (44) 30
P. Chevalier (44) 30
A. Raulet (44) 30
Y. Guérant (94) 30
G. Pienne (51) 30
J.-M. Guillon (45) 30
Club Retraités, Le Mans (72) .. 30
J. Bénistant (72) 30
G. Prigent (84) 30
A. Kristos (63) 30
P. Jelenc (Suède) 30
F. Jélenc (86) 30
A. Hervouet (92) 30
R. Mauchien (80) 30
J. Philippeau (44) 60
P. Boissou (75) 30
C. Hueter (63) 30
M. Ferrut (25) 50
D. Bourgeois (Suisse) 30
P. Montagné (27) 30
P. Cavelan (83) 30
S. Loiseau (56) 50
G. Lemonnier (92) 50
J.-P. Beau (13) 50

TOTAL : **4.680**

Maison Culturelle Espérantiste

PROGRAMME 1978

PAQUES

Arrivée : Samedi 8 Avril — Départ : Samedi 15 Avril

— **RENCONTRE D'ENFANTS.**

— **« COMMENT FAIRE UN COURS ? »** (pédagogie pratique).

ETE

1) **Arrivée : Lundi 3 Juillet — Départ : Samedi 22 Juillet**

PREMIERE PERIODE

CONFERENCES - DISCUSSIONS - ACTIVITES MANUELLES - EXCURSIONS
SOIREES RECREATIVES - COURS DE PRATIQUE

2) **Arrivée : Dimanche 23 juillet — Départ : Samedi 12 Août**

DEUXIEME PERIODE

COURS DES 3 DEGRES - ACTIVITES MANUELLES
EXCURSIONS - SOIREES RECREATIVES

3) **Arrivée : Dimanche 13 Août — Départ : Samedi 2 Septembre**

TROISIEME PERIODE

PROGRAMME IDENTIQUE A CELUI DE LA DEUXIEME PERIODE

Retenez vos chambres à l'avance

Renseignements et inscriptions :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
CHATEAU DE GRESILLON - 49150 BAUGE